## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, vendrede

**la 26-an de aprilo**
**ĉe Gilbert Darbellay**
**(079 315 14 13)**
ch. de l'Orme 6 à 1054 Morrens

**la 10-an de majo**
**ĉe Monique Golaz**
**(079 754 21 60)**
Ecole de Commerce 3 à Lausanne

**la 24-an de majo**
**ĉe Cléa Robin (079 330 04 03)**
ch. Culat 20 à 1896 Vouvry

**Ne forgesu aliĝi per**
http://doodle.com/teum7w3gz46vdyc6

## Bazaro

… okazos je la 9-a, sabate

**la 4-an, la 18-an de majo**
**kaj la 1-an de junio,**
placo *la Palud* en Lausanne.

***Venu por konigi la internacian lingvon***

Aliĝu pere de
http://www.doodle.com/5eaxhdsx4sh8vru4

## Enigmo

*Patro kaj siaj du filoj devas trapasi ĝangalan riveron. Ili havas barkon, kiu povas porti nur 100kg. La patro pezas 100kg kaj ĉiu filo pezas 50kg. Kiel ili povas transiri al la alia flanko sen naĝi ? Estas krokodiloj….*

**Laŭzana Esperanto – Societo**
Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 (0) 76 411 14 55 * +41 (0) 21 647 29 28
info@esperanto-lausanne.ch * www.esperanto-lausanne.ch
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin * 076 411 14 55 - Kasistino.: Françoise Pétermann *079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier *021 961 38 56

# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

Majo 2013 – n° 5

Venu al la pervidea prelego de

## Vahid el Montrealo

***kiu parolos pri sia vivo en Kanado***

**lunde, la 6-an de majo 2013,**

je la 20-a, ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo

*Jara ekskurso al Ĝenevo*

## Sabate, la 15-an de junio

*Aliĝu ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier*
tel. *021 961 38 56* aŭ rete al kma.sunier@bluewin.ch

*** antaŭ la 1-a de junio ***

La informoj pri detaloj enestos la venontan informilon

***Programparto:***

- *Gvidata vizito de la botanika ĝardeno*
- *Pikniko en parko*
- *Vizito de la ŝprucfontano*
- *Omaĝo al Zamenhof*

**somera paŭzo**

***Lunde, la 2-an de septembro***

*Projekciado de filmoj*

# Esperanto en Palexpo

Karaj Gesamideanoj,

Kun granda plezuro mi skribas al vi kelkajn novaĵojn el Svislando. Eble vi scias, ke tradicie ekde pli ol 40 jaroj ĉiu printempo okazas en Ĝenevo la « Salono de la Inventaĵoj ». Apud la flughaveno troviĝas granda halo, kie la inventistoj prezentas siajn novaĵojn. Ĉi-jare ili venis el pli ol 40 landoj. La *Svisa Esperanto-Societo* kaptis la okazon montri nian lingvon al la vizitantoj kaj ekspoziciantoj. Sonja kaj mi ricevis tiun taskon. Jam en februaro ni partoprenis renkonton kun la estraro kaj ricevis enirbiletojn kun favora prezo por disdoni ĉirkaŭ ni. En niaj kapoj ni havis ideojn pri tiu ekspozicio sed, kiam la 8-an de aprilo ni malkovris nian malgrandan budon ($3m^2$) ni vidis, ke ne eblas fari ion kiel pasintjare en Vevey. Do, estis devigo ŝanĝi niajn planojn. Marde la 9-an ni denove veturis al Ĝenevo kun nia materialo kaj organizis nian budeton inter 725 aliaj. Multaj estis el Saud-Arabio, Koreo, Ĉinio, kaj aliaj el Eŭropo, Rumanio, Germanio, Pollando, Britio, Francio ktp, eĉ Svislando. Finfine, ni estis kontentaj, ĉar vere estis mirinda montrofenestro por Esperanto.


Inter la 10-a kaj 14-a de aprilo ni agadis por nia lingvo. Kun granda plezuro ni prezentis ĝin al la publiko klarigante ĝian historion, facilecon, utilecon, eĉ ĝian belecon kaj kial estas bone lerni ĝin. La disdonitaj enirbiletoj havis grandan sukceson, venis inter aliaj multe da esperantistoj el Laŭzano, Ĝenevo, najbara Francio, ktp. La plej grava estis la interesitaj personoj, kiuj sciis nenion aŭ nur idiotaĵoj pri la lingvo. Kun granda plezuro kaj helpe de « Jarlibro, Pasporta Servo, kaj la Eta Princo » ni montris kaj respondis al la lavango da informpetoj. Ili povis legis franclingve kolorajn panelojn kaj afiŝojn. Dum tiuj 5 tagoj vere estis mirinde por ni montri, ke Esperanto estas vera, plena, facila, belsona, logika, senlima, neŭtrala kaj vivanta lingvo. La vizitantoj estis surprizitaj malkovri, ke ĝi estas parolata sur la kvin kontinentoj. Ni klarigis pri la nombro, utileco kaj tasko de la delegitoj, la vojaĝmaniero per *Pasporta Servo*, sen forgesi la kongresojn, renkontojn, gazetojn, librojn, kantojn, ktp.... Por pruvi ĉion ni legis kelkajn liniojn el *"La Eta Princo"*, tiel ili povis aŭskulti la akcenton kaj la muzikon de la lingvo.

Okaze de tiu evento ni vere havis la impreson, ke estis la ĝusta loko por varbi pri nia lingvo. Ni semis, semis kaj esperas, ke la semitaj grajnoj ĝermos rapide en tiu fekunda medio.

Ni sendas al vi ĉiuj niajn verdajn salutojn. Vivu Esperanto !

Viaj Karlota kaj Sonia

**Kaj, por fini, eta ludo :**



**Ludu ni!**

Jen kadro kiu entenas la birdo-nomojn de la ĉi-suba listo (sen la fina O). Unue, vi trovu kaj forstreku ĉiun nomon. Ĉiu litero servas nur unu fojon. La vortoj ĉiam sekvas rektan linion sed povas esti horizontalaj, vertikalaj aŭ oblikvaj. La liter-ordo povas esti normala aŭ inversa (de dekstre maldekstren, de malsupre supren...) Due, restos 6 ne-uzitaj literoj el kiuj vi formos la nomon de la kaŝita birdo.

E. BARBAY

Najtingal/o – Albatros/o – Akcipitr/o – Meleagr/o – Perdrik/o – Sfenisk/o – Cikoni/o – Kolomb/o – Vultur/o – Anser/o – Fring/o – Arde/o – Otus/o – Agl/o – Gru/o – Mev/o – Peg/o

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| N | V | U | L | T | U | R | G | E | P |
| C | A | M | P | E | R | D | R | I | K |
| A | I | J | E | A | R | L | G | A | S |
| K | A | K | T | L | N | B | I | M | O |
| C | U | R | O | I | E | S | L | E | R |
| I | K | R | D | N | N | A | E | V | T |
| P | S | O | G | E | I | G | G | R | A |
| I | U | F | R | I | N | G | A | R | B |
| T | T | B | M | O | L | O | K | L | L |
| R | O | K | S | I | N | E | F | S | A |

La 6 restantaj literoj:

______

La kaŝita birdo estas:

______O

**La solvo en la venonta informilo !**